




**tejo**  
tutmonde

tutmonda esperantista junulara organizo



## Esperanto-agado en lernejoj en Burundo

**Esperanto por  
interreligia  
dialogo en Azio**

**Nova TEJO-  
volontulo en la  
Centra Oficejo**

**Oranĝa  
Renkontiĝo  
en Svedujo**



### Karaj legantoj!

Jen la lasta numero de TEJO Tutmonde de la jaro 2008 (kiun vi tamen eble ricevas nur komence de 2009). Krom intervjuon kun la nova TEJO-volontulo en Roterdamo, ĝi enhavas diversajn raportojn pri loka kaj landa agado en Afriko, Azio kaj Eŭropo. Aparte

Aparte interesa raporto estas tiu pri la junulara renkontiĝo inter Ŭonbulismo kaj Oomoto, du aziaj religioj kun pozitivaj sintentoj al Esperanto. La raporto pri Esperanto-agado en Burundaj lernejoj montras la vivecon de nia lingvo en tiu mondoparto. Kaj la raportoj el Eŭropo venas el du lokoj sufiĉe distancaj inter si (almenaŭ laŭ Eŭropaj mezuroj): Italujo kaj Svedujo.

Krome mi publikigas ĉi-numere lingvajn gvidliniojn de TEJO Tutmonde, por ke kontribuantoj povu pli bone kompreni, kiel kaj kial iliaj kontribuoj povas esti lingve redaktataj antaŭ

publikigo.

Do, mi esperas ke vi ĝuos la diversan enhavon kaj deziras al vi agrablan legadon!

Marcos

### Enhavo

|                                   |       |
|-----------------------------------|-------|
| Aperis nova subvencio por         |       |
| Korea Esperanto-Junularo .....    | 3     |
| Intervjuo kun nova                |       |
| TEJO-volontulo .....              | 3-4   |
| Esperanto-agado                   |       |
| en tri Burundaj lernejoj .....    | 4-6   |
| Unua Junulara Renkontiĝo inter    |       |
| Ŭonbulismo kaj Oomoto .....       | 7-9   |
| Informado dum                     |       |
| komiksa foiro en Italujo .....    | 9     |
| Prelego pri Esperanto ĉe Junulara |       |
| Forumo en Triesto, Italujo .....  | 10-12 |
| Kiel oni pasigas la Oranĝan       |       |
| Renkontiĝon en Svedujo .....      | 12-13 |
| 1887 membroj uzas                 |       |
| la Jarlibron rete .....           | 14    |
| Kontakt-informoj                  |       |
| kaj informoj pri TEJO .....       | 15    |
| Lingvaj gvidlinioj                |       |
| de TEJO Tutmonde .....            | 14,16 |

Mapo sur la kovrilpaĝo kreita de la uzanto Reiertur de la Vikimedia Komunejo (permesilo: cc-by)

### Limdato por 2009:2 – 15-a de Marto 2009!

TEJO Tutmonde estas dumonata oficiala gazeto de TEJO pri la junulara Esperanto-movado. Ĝin ricevas ĉiuj individuaj membroj kaj patronoj de TEJO. Landaj junularaj Esperanto-organizaĵoj povas ricevi ĝin.

Kontribuojn sendu rete al [tejo-tutmonde@tejo.org](mailto:tejo-tutmonde@tejo.org) (per normala mesaĝo aŭ kiel kunsendita tekst-dosiero), aŭ paperpoŝte al la adreso: TEJO Tutmonde (Marcos CRAMER), Königwinterer Straße 204, 53227 Bonn, Germanujo. Fotojn/bildojn sendu kiel JPEG. **Viaj kontribuoj estas bonvenegaj kaj necesaj!**

Aliaj Esperanto-gazetoj rajtas republikigi artikolojn el TEJO Tutmonde kondiĉe ke ili mencias la fonton.

Redaktisto: **Marcos CRAMER** (Germanujo). Demandojn pri membrecoj, abonoj, distribuo ktp. sendu al: TEJO, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando; rete: [oficejo@tejo.org](mailto:oficejo@tejo.org). Presado: SKONPRES, Bydgoszcz, Polujo; rete: [skonpres@poczta.onet.pl](mailto:skonpres@poczta.onet.pl). **La redaktisto kaj la eldonanto ne respondecas pri la opinioj de unuopaj aŭtoroj.**

## Aperis nova subvencio por Korea Esperanto-Junularo

Du koreaj esperantistoj KIM Hi-seok kaj KIM Jin-ho proponis al Korea Esperanto-Junularo fondi novan subvenci-sistemon por ke multaj gejunuloj partoprenu en enlandaj Esperanto-eventoj. Ili garantiis mondonaci ĉiujare almenaŭ 1,000,000 ŭonojn (ĉ. 550 eŭrojn). Tuj post tio aliaj 4 koreaj esperantistoj promesis subvencii pli da mono al KEJ.

KEJ publikigis ĝian oficialan aliĝilon libere elŝuteblan en sia retejo, kaj naŭ gejunuloj ricevis duonon de la sumo de partoprenkotizo plus veturkosto, por lerni Esperanton en la 17-a Namkang Esperanto-Lernejo, kiu okazis en la 15-a kaj 16-a de novembro en la urbeto Cheongdo. Danke al la nova sistemo, ĝin partoprenis sume 11 gejunuloj, inkluzive de tiuj, kiuj ne aliĝis por ricevi la monon. La nombro de ĉiuj partoprenantoj superis 40.

KEJ daŭrigos la sistemon por plialitigi



la lingvan kapablon de siaj membroj kaj plimultigi siajn membrojn kaj fine pliaktivigi la junularan movadon en Koreujo.

SONG Ho-young

Prezidanto de Korea Esperanto-Junularo

## Intervjuo kun nova TEJO-volontulo

- Saluton Federico! Rakontu iom pri vi mem!

Saluton! Nu, pri mi mem... Mi estas hispano kvankam mi naskiĝis en



Argentino, antaŭ preskaŭ 22 jaroj. Mi studis en la universitato de la belega urbo Salamanko pri tradukado kaj interpretado de la angla kaj la franca lingvoj. Estas memvideble, ke mi ŝategas lingvojn (nestranga afero inter esperantistoj!) sed alia samnivela pasio mia estas sendube muziko.

- Kiel kaj kiam vi esperantistiĝis?

Antaŭ du jaroj kaj kelkaj monatoj mi konatiĝis kun alia studento de mia fakultato, kiu hazarde ekparolis al mi pri Esperanto. Mi do rete serĉis informon pri ĝi kaj trovis kurson por memlernantoj. Per tiu programo kaj kun la helpo de mia amiko mi sukcesis lerni la gramatikon

sufiĉe rapide, kaj poste venis la tempo lerni la vortojn!

- Ĉu vi jam antaŭe aktivis en la Esperanto-movado? Se jes, kiel?

En Salamanko estas nuntempe preskaŭ nenio rilate al Esperanto, do estis tre malfacile. Tamen, mi estis estrarano de la delegitaro de mia fakultato kaj tie mi organizis esperanto-kurson kun dudeko da lernantoj kaj ĉirkaŭ 60 homoj, kiuj bedaŭrinde ne plu havis lokon.

- Kial vi decidis volontuli en la Centra Oficejo?

Mi iom parolas la nederlandan kaj mi ŝatus eklabori profesie per ĝi (pri tradukado kaj interpretado). Tamen, mia nuna nivelo estas pli taŭga por ĉiutagaj aferoj kaj mi decidis, ke mi iros al Nederlando por plulerni, ĉar en Flandrujo, kie ankaŭ la nederlanda estas oficiala lingvo, mi jam faris somerkurson. Oni ja bezonas tre profundan konon de lingvo por interpreti!

- Kion vi volas fari por TEJO?

Mi ŝatus bone prizorgi la oficejajn ĉiutagajn farendadojn kaj cetera helpi al la estraro, la komitato kaj la membroj pri tio, kion ili bezonos. Mi ĉiukaze ĝojas ĉar mi certas, ke tiel mi ankaŭ multe lernos.

Mi esperas, ke mia sperto, rilate aŭ al Esperanto aŭ al aliaj aferoj, estos utila dum la venonta jaro.

- Kiaj estas viaj ĝisnunaj impresoj pri la TEJO-laboro, la Centra Oficejo ĝenerale, viaj kolegoj, la oficeja etoso kaj la vivo en Roterdamo?

La laboro estas sufiĉe divers-speca, do mi estas kontenta pri tio. La Centra Oficejo estas tre agrabla loko kaj la oficistoj simpatiaj. Ili ĉiam pretas helpi kaj oni ankaŭ babilas pri multaj aferoj. Estas facile trovi komunajn ŝatokupojn, pri kiuj oni povas paroli. Kaj pri Roterdamo ... por mi estas iom strange nur preterpasi ĉiutage tiujn altegajn ĉiel-skrapantojn! Mi neniam antaŭe vivis en tia urbo, sed mi certete alkitimiĝos!

- Ĉu vi volas lerni la nederlandan lingvon vivante nun en Nederlando?

Kiel mi diris, mi jam iom parolas la nederlandan. Estas iomete malfacile ekzerci ĝin ĉar homoj baldaŭ ekparolas per la angla se ili rimarkas, ke la alia havas iom strangan akĉenton. Tial mi ĉiam diras, ke mi preferas paroli per la nederlanda, por plulerni, kaj tiam ili volonte (kaj malpli rapide!) daŭrigas la konversacion nederlandlige.

## **Esperanto-agado en tri Burundaj lernejoj**

La 16-an de oktobro, la 25-an de oktobro kaj la 1-an de Novembro 2008 okazis oficialaj malfermoj de agadoj de la kluboj por la lernojaro 2008-2009 en tri liceoj de la ĉefurbo : Lycée du Lac Tanganyika, Ecole Normale de Ngagara kaj Lycée Municipal de Buyenzi.

La unuan ĉefurban lernejan klubon ni starigis en 2004 ĉe Lycée du Lac Tanganyika (laga tanganjika liceo), kaj

poste ni ekstarigis klubojn en aliaj apudaj lernejoj. Lernantoj sekvas kurson dum unu jaro, kaj la venontan jaron ili starigas kaj gvidas klubojn en aliaj lernejoj. Do, ĉi tiu strategio ege kontribuis al nia sukceso ĉar nun preskaŭ en ĉiuj gravaj liceoj (urbocentre) estas kluboj.

Jen detalaj raportoj pri la unuopaj eventoj:



### **Raporto pri oficiala malfermo ĉe Tanganjika Laga Liceo de Buĵumburo**

Okazis oficiala malfermo de la agadoj de la Esperanto-klubo ĉe Tanganjika laga liceo por la lernojaro 2008-2009, la 16-an de oktobro 2008. LLT (Lycée du Lac Tanganjika) estas unu el la plej grandaj publikaj lernejoj de la ĉefurbo, kun ĉirkaŭ 1500 gelernantoj, kaj la unua gimnazia lernejo, kiu ekhavis klubon pri Esperanto en la ĉefurbo dum la jaro 2004.

La evento estis bone organizita ĉar la afiŝoj pri Esperanto pendiĝis je diversaj lokoj de la liceo por ke multaj gelernantoj havu informon pri la oficiala malfermo; tio ankaŭ okazis en aliaj lernejoj kluboj. Dank al akiritaj spertoj de membroj de nia Asocio pri Esperanto (ANEB) kaj al la sindono de junaj aktivuloj, Esperanto eniras multajn novajn lokojn de Burundo.

Due, dum la malferma ceremonio, okazis prelegoj pri Esperanto kaj intertempe varbado de novaj esperantistoj. Membroj de la klubo kunlaboris kun la delegacio por pli bone kaj sukcese okazigi la eventon. La delegacio de ANEB prelegis resume pri Zamenhof, la historio de Esperanto kaj iomete klarigis la kialon de la ekzisto de ĉi tiu lingvo kaj kom-

preneble ties principojn universalajn. Sekve, partoprenis 26 gelernantoj de malsamaj aĝoj (12-22 jaroj). Ĉi tiu malsameco de aĝoj estas ege esperiga ĉar ĉi tiuj beboj (se vi permesas al mi uzi la vorton) grandiĝos en klubo, sin nutros per Esperanto kaj ege helpos en la estonteco. La klubo

bezonas gekorespondantojn kaj ĉiajn malnovajn revuojn. Bonvolu sendi al ANEB, BP 170 Rumonge, Burundo.

### **Oficiala malfermo ĉe EN Ngagara (Ecole Normale)**

La 25-an de oktobro 2008, okazis oficiala malfermo ĉe EN (Ecole Normale) Ngagara, la liceo kiu troviĝas en la norda parto de Buĵumburo. La lernejo estas internuleja por lernantoj kiuj estas en finaj klasoj kaj eksterulejo por aliaj klasoj. Esperantoklubo ekzistas en ĉi tiu liceo ekde la pasinta jaro. En ĉi tiu liceo okazis la unua internacia seminario de Esperanto gvidita de Tereza KAPISTA en





2005, seminario kiu venis por organizi kaj plifortigi la burundan movadon.

La malferma agado ekis je la 11:00 poste komunaj laboroj. Partoprenis 24 lernantoj (kies aĝoj estas inter 14-25) el 64, kiuj enskribiĝis en la listo de la respondeculo, S-ro Alexis NZIGAMA-SABO. Laŭ la respondeculo, multaj ne venis pro du kialoj: Unue, la lernejo havas internulojn kaj eksterulojn. Neniu eksterulo ĉeestis ĉar por ili, sabate ne estas kurso, do ili ne povas veni al lernejo. Due, multaj lernantoj estis informitaj pri la malfermo sed la dato kaj la horo ne estis komunikitaj al ili. La klubo okazos vendrede por eksteruloj kaj sabate por internuloj.

Poste longaj kaj bonhavaj prelegoj, okazis enkonduko de Esperanto, ĝia alfabeton kaj pronoco. Nome de la geklubanoj, Alexis NZIGAMASABO (la respondeculo) dankis la Asocion, kiu sendis ĝian delegacion por vidi reale kio okazas tie, kaj kiujn malfacilecojn ili havas. ANEB promesis helpi laŭ sia eblo

por ke la klubo pli bone funkciiu. Bonvolu helpi per verk(et)oj en facila Esperanto kaj revueto de Juna amiko.

### **Oficiala malfermo ĉe la Urba Liceo de Buyenzi**

La 1-an de Novembro 2008 je la 15-a horo okazis oficiala malferma evento de la agadoj de Esperanta klubo aganta en ĉi tiu lernejo. La lernejo troviĝas en la urbocentro de Buĵumburo, je la limo de la kvartaloj Buyenzi kaj Bwiza kaj pro tio ne nur junuloj de Buyenzi frekventas la lernejon sed ankaŭ tiuj de Bwiza, la najbara kvartalo de Buyenzi. Tie la klubo ekzistis kaj normale funkcias ekde la pasinta jaro.

Bedaŭrinde, dum la semajno de nia oficiala malfermo la lernejoj en Burund ne bone funkciis pro la striko de instruistoj kaj pro ĉi tiu fakto, ne partoprenis multaj lernantoj, nur venis malnovaj membroj de la klubo kaj kelkaj novaj esperantistoj. Nia celo estis varbi novajn gelernantojn preleginte favore al Esperanto.

Kiel kutime ANEB sendis sian delegacion por efike informadi kaj kapti multajn novajn klubanojn. Certe, kiel okazis en multaj liceoj, la strategio de ANEB efikas ĉar nekonatuloj pli bone varbas aŭ konvikas ol konatuloj, kaj pro tio necesas ĉiam sendi nekonatulojn de la lokanoj por akompani konatulojn. La ceremonion partoprenis 23 personoj, sed laŭ informoj de la klubestro, oni esperas ke la nombro de la klubanoj atingos 35.

SABIYUMVA Jérémie, Burundo



## Unua Junulara Renkontiĝo inter Ŭonbulismo kaj Oomoto

Kiam mi pasintjare okupiĝis pri la 26-a Komuna Seminario, preskaŭ samtempe mi eklaboris kiel leter-tradukanto kaj helpanto inter la junulara fako de Oomoto kaj la organizo 'Amikoj de Paco' apartenanta al la Junulara Asocio de Ŭonbulismo. Kvankam mi mem ne estas Ŭonbulano, tamen mi volonte akceptis la rolon kiel simpatianto al ambaŭ religioj.

Tiu ĉi renkontiĝo estis decidita je la 9-a de aprilo en 2007, inter la ĝenerala sekretario de 'Amiko de Paco,' YUN Bup-dal kaj la prezidanto de la junulara fako de Oomoto, NARUO Tadaŝi. Laŭ la rezulto de la kunsido, Amikoj de Paco ĉi-jare sendis Ŭonbulanajn gejunulojn al Oomoto ekde la 12-a ĝis la 15-a de aŭgusto, kaj venontjare junaj oomotanoj vizitos Koreujon por la alterne okazonta renkontiĝo.

La 12-an de aŭgusto, al Kansaja flughaveno alvenis 6 koreaj partoprenantoj inkluzive de s-ro YUN Bup-dal (ĝenerala sekretario de Amiko de Paco), JU Ye-ji (prezidanto de La Seula Studentara Organizo de Ŭonbulismo), JO Gyeong heum (vicprezidanto), GANG Hye-jin (vicprezidanto), SONG Ho-young (interpretanto kaj helpanto), LIM Jung-hyeon (esperantista jodlisto). La renkontiĝo ne akceptis ekskluzive nur Ŭonbulanojn, do ankaŭ esperantistoj, kiuj simpatias al ĝia celo, rajtis partopreni kondiĉe ke ili sincere observos konduton de Ŭonbulanoj.

Ĉe la flughaveno nin varme bonvenigis s-ro OKUWAKI Toshiomi,

kiu res-pondecis pri kontakto kun Amikoj de Paco. Ni kune veturis al Kameoka per la aŭtobuso preta por koreoj. 'Junulara Festivalo de Oomoto' mem komenciĝas ekde la 13-a de aŭgusto, sed en la vespero de la 12-a okazis eta kunveno por bonvenigi koreajn junulojn. Kolektiĝis ne nur estraranoj de la junulara fako de Oomoto, sed ankaŭ gravaj funkciuloj de Oomoto kaj EPA (Esperanto-Populariga Asocio), interalie ĉeestis ankaŭ s-ro AGOU Takaŝi (konstanta direktoro de EPA) kaj s-ro TABUĈI Jasuo, kiu aŭguste partoprenis en 'La 3-a Internacia Esperanto- Renkontiĝo de Ŭonbulismo' okazinta en Seulo, Koreujo. En gaja etoso, la gratulmesaĝo de s-ro LEE Jung-kee (prezidanto de KAEM) estis voĉlegita. La ĝenerala sekretario YUN Bup-dal kaj la prezidanto Naruo Tadaŝi interŝanĝis donacojn kun granda aplaŭdo. Ĉiuj koreaj partoprenantoj sin prezentis kaj ĝuis la tuj sekvantan bankedon plenigitan per danco, kanto kaj gitarludo. La 13-an de aŭgusto, ni ĉiuj vekiĝis frumatene por ĉeesti en matena preĝado, kiu okazis en la plej granda kaj ĉefa preĝejo nomata 'Banŝooden'. Kvankam la ĉeesto ne estis deviga por ĉiuj koreoj,



ni klopodis laŭeble fari tion. Matenmanĝinte koreaj partoprenantoj kaj junaj oomotanoj kune ekveturis por ekskurso al Kioto. Ekskursanoj vizitis la budaisman templon 'Kinkakuji', la ŝintoisman sanktejon 'Kamigamojinja' kaj la fame konatan kastelon 'Nijo' kaj ankaŭ la pitoreskan turismejon 'Arashiyama'.

Post la ekskurso okazis malferma ceremonio de la Junulara Festivalo de Oomoto, komence de ŝintoisma rito kun tre solena atmosfero. En ĝi koreaj partoprenantoj denove sin prezentis antaŭ ĉiuj oomotanaj ĉeestantoj, kiuj sidis dividite laŭ siaj regionoj. Vere surprizis koreojn la reagoj de junaj oomotanoj, ĉar ili almenaŭ sciis pri bazaj vortoj por saluti kaj danki en Esperanto. Ĝenerala sekretario Yun prezentis al ĉiuj partoprenantoj Ŭonbulismon kaj disvolvadan de Amikoj de Paco per klarigo kaj filmeto.

Je la 14-a, koreaj partoprenantoj kaj kelkaj oomotanaj junuloj kune rigardis la filmojn titolitajn 'Paŝoj de Oomoto' kaj 'Uta-festo', kiuj bone klarigas historion, kulturon kaj festivalon de Oomoto. Post la rigardo, mi resume tradukis la enhavon en la korean por koreoj, kaj ili demandis s-ron Okuwaki precipe pri internacia



koreaj junuloj kantas kun japanaj vestoj donacitaj de Oomoto

agado de Oomoto. Kortuŝiga punkto estis, ke la vidbendo 'Uta-festo' ne estas publikigata eĉ al oomotanoj, sed ĝi estis speciale permesita por junaj koreaj ŭonbulanoj. Ni ĉiuj sentis, kiom sincere Oomoto esperas amikan rilaton kun Ŭonbulismo.

Post tio ni promenis en la sankta tereno de la Oomoto-centro, sub la gvido de s-roj Okuwaki kaj Onizuka. La historio de Oomoto, pri kiu ni vidis jam en vidbendoj, estis bone respegulita en ĉiuj aspektoj de la sankta tereno. Estis bona ŝanco pli profunde kompreni Oomoton.

Alia grava okazo estis interreligia kunsido kun estraranoj de la junulara fako de Oomoto. Dum la vigla kunsido, mi kaj s-ro Okuwaki interpretis inter du flankoj. Ni diskutis precipe pri organizado de la venontjara renkontiĝo en Koreujo. S-ro Yun respondis, ke provizora plano estas partoprenigi junajn oomotanojn unue en 'La 4-an Internacian Esperanto-Renkontiĝon de Ŭonbulismo' kaj tuj poste havi apartan aranĝon kune kun junaj ŭonbulanoj, eventuale per hejmgastigado.

Vespere komenciĝis interkona vespero en ekstera placeto. Junaj oomotanoj amuzis ĉeestantojn per ludo kaj komika skeĉo. Koreaj partoprenantoj kantis sur la podio ŭonbulisman kanton Ĉ iame luma: luno (esperantigita de s-ro CHOE Taesok). Kaj ĉiuj kune kantis faman japanan kanton Uŭ omuite arukou Ankaŭ jodla ludo de s-ro Lim Jung-hyeon ricevis varman aplaŭdon. Post tio ĉiuj kune faris Miroku-dancon rondirant ĉirkaŭ muzikludantoj.

Dum la lasta tago (la 15-a), dum la ferma ceremonio, koreaj partoprenantoj havis honoron aŭdienci la spiritan gvidanton de Oomoto, DEGUĈI



Kurenai. Aŭdienco kun granda majstro de iu religio estas iasence tre streĉiga kaj ŝvitiga, sed ŝi elkore salutis nin kun trankviliga kaj afabla rideto. Ĉeestinte la ferman ceremonion de la festo, koreoj ekiris al Kansaja flughaveno por reveni al Koreujo, kunportante multajn donacojn de Oomoto.

Kiel helpanto kaj interpretanto, mi kredas, ke tiuj ĉi interreligiaj renkontiĝoj

kaj kunlaboro per Esperanto estas tute maloftaj almenaŭ en Azio, kaj sendube karaj kaj valoraj. Kvankam ne-ŝonbulano, mi ankaŭ tutkore esperas, ke la renkontiĝo sukcese daŭros kaj kontribuos al ne nur nuna, sed ankaŭ estonta rilato inter la du religioj.

SONG Ho-young (prezidanto de Korea Esperanto-Junularo)

## Informado dum komiksa foiro

Danke al la helpo de Pisa Esperanto-grupo kaj de aliaj volontuloj, ankaŭ ĉi-jare Itala Esperantista Junularo kaj Itala Esperanto-Federacio starigis la kutiman informan budon okaze de la 42-a fojo de *Lucca Comics and Games 2008*, la plej grava kaj fama foiro pri komiksoj en tuta Eŭropo. Dum la aranĝo, kiu kutime okazas en la semajno de haloveno (31-a de Oktobro), la toskanan urbon invadis miloj da festemaj junuloj kaj komiks-temaj maskuloj.

Ĉi jare estis venditaj pli ol 130.000 biletoj kaj oni kalkulis ke la foiro entute estis altirinta en la urbo pli ol 350.000 homojn (malgraŭ la pluveto kiu iom fuŝis la du komencajn tagojn). Inter la honor-gastoj oni invitis tre famajn homojn kiel: John ROMITA Jr (fama desegnisto de Marvel), Kohta HIRANO (aŭtoro de Hellsing), Grzegorz ROSINSKI (pola desegnisto) Ligabue (fama itala kantisto) kaj Dario ARGENTO (reĝisoro).

Speciale por tiu okazo la Itala Esperanto-Federacio eldonis poŝ-kalendareton kiu estis disdonita kune kun esperanta bildstria flugfolio. Ĉefe dum la lastaj tagoj multegaj scivolemuloj alproksimiĝis al nia budo: iuj por peti informojn, iuj aliaj altiritaj de la esperantigitaj versioj de

famaj komiksoj (ege raraj kolektaĵoj por ili) kiujn bedaŭrinde ni ne rajtis vendi malgraŭ la multaj petoj.

Kune kun Lucca Comics oni organizis ankaŭ la 3an EsperantoTagon; en la tuttaga aranĝo partoprenis deko da junuloj al kiuj la lokanoj, evitante la tro homplenajn zonojn, sukcesis montri la kaŝitajn vidindaĵojn de la urbo.

Sume, la Esperanta budo estis tute pozitiva sperto: multaj kontaktoj kolektitaj, multaj flugfolioj disdonitaj, kaj la vorto Esperanto vidita de miloj de homoj.

Do, ĝis revido venontjare: kiam espereble ni ankaŭ prezentos novan bildstrion.

Oliviero BAGNOLI



## Ĉu junuloj kredas je iu internacia lingvo?

**Esperantista prelego ĉe Internacia Junulara Forumo “Rajto por dialogo”, okazinta la 26an ĝis 28an de Septembro en Triesto, Italujo.**

Ĝuste je la Eŭropa tago de Lingvoj komenciĝis Internacia Junulara Forumo “Rajto por dialogo”, organizita de loka senprofita asocio “Poezio kaj solidareco”. La Forumo celis ebligi interŝanĝon de specifaj spertoj inter junaj verkistoj, ĵurnalistoj, aktivuloj de volontulaj asocioj, studentoj pri sociaj sciencoj rilate internacian kunlaboron kaj solidarecon, verkadon, tradukadon kaj komunikadon. La Forumo inkluzivis ankaŭ porjunulan konkurson de poeziaĵoj.

Oni danku s-inon Gabriella Valera GRUBER, profesorinon de Triesta Universitato, pro sia sindona kunordiga laboro, kiu rezultigis en multaj patronecoj kaj do monhelpoj, sufiĉe vasta informado pri la evento kaj preparo de kvalitaj disdon-materialoj, kaj finfine en komforta enloĝigo kaj etaj eksterforumaj programeroj. Esperantistojn invitis al Forumo Sino Gruber mem kaj proponis prelegi pri “ĉu junuloj kredas je iu universala lingvo?”



Partoprenantoj venis de pli ol dekkvino de landoj (ĉefe de centra kaj orienta Eŭropo kaj Balkanoj, sed ankaŭ de Usono, Rusujo, Sudafriko) kaj estis entute ĉirkaŭ 40 kune kun siaj italaj kolegoj. Prelegantoj estis plejparte 18-30 jaraĝaj, escepte de kelkaj mezaĝaj prelegantoj kaj honoraj gastoj. Ekzemple fama nuntempa verkisto Boris Pahor, kiu partoprenis la inaŭguron, 95-jarojn aĝa, travivinta multon, talenta kaj saĝa.

La Forumo estis oficiale dulingva kaj oni provizis samtempan profesiecan tradukon de la angla al la itala kaj inverse. Tamen la nombro de prelegoj en la angla superis tiujn en la itala, eĉ en okazoj, kiam la preleganto scipovis paroli ambaŭ lingvojn. Foje tio eĉ difektis la kvaliton de kelkaj prelegoj kaj iasence estis *evidenta* pruvo, ke malfacilas

dialogi, kiam oni devas tiom entrudiĝi pri la lingva flanko de komunikado.

La temon oni traktis de multaj eblaj flankoj kaj oni vere sentis ke junularo de malsamaj landoj emas kunlabori malgraŭ politikaj kaj ekonomiaj malfacilaĵoj. Tuj naskiĝadis ideoj kaj proponoj de kunlaboro kaj tio ne ŝajnis esti nur ĝentileco (aŭ “politike korekta” hipokriteco) de similaj “plenkreskulaĵ” forumoj. Etoso estis vere aŭskultema, parolema, kreema, interŝanĝema, unuvorte vere dialoga.

Esperanta preleganto estis Alla KUDRYASHOVA, kiu reprezentis samtempe sian devenlandon – Rusujon – kaj ankaŭ ĝenerale la Esperanto-movadon. Prepariĝi por ŝia prelego dum Forumo helpis memkompreneble ankaŭ aliaj esperantistoj: unu provlegis la tekston, alia konsilis informfontojn, la tria portis librojn, la kvara venis ĉe stacidomo ☺ Tiumaniere *kutima por esperantistoj* frateca, helpema aliro kaj sinteno sentebliis kaj videblis ankaŭ al ne-esperantistoj. Dum prelego dimanĉon matene ĉeestis en forumejo ankaŭ kelkaj lokaj esperantistoj: Edvige ACKERMANN, Elda DOERFLER kaj franca studento François STRIDE. Oni rimarkis ilin parolantajn flue inter si en Esperanto, kvankam, pro koincido, ambaŭ Alla kaj François scipovas la italan.

Dum sia prelegeto, Alla legis antaŭe verkitan prelegon en la itala lingvo kaj samtempe montris koncernan prezenton pere de komputilo. Intertempe, en la enireja halo estis organizita eta budo, kie oni povis vidi kaj trafolumi kelkajn Esperanto-librojn kaj preni informilojn pri lokaj iniciatoj aŭ ĝenerale pri Esperanto. Post prelego aperis kelkaj reeĥoj, sed bedaŭrinde ne plu enkadre de



Alla prelegas interalie pri Esperanto

la oficiala diskuto, ĉar la Forumo estis malfermita tagmeze.

Kelkaj partoprenantoj estis aparte aktivaj kaj esperdonaj pri estontaj projektoj. Ekzemple, aperis ideo kunvenigi (kunlabore kun Autori Online) en Romo aŭ denove en Triesto junajn Esperanto-verkistojn kaj tradukistojn de kelkaj landoj kune kun tiuj neesperantistaj kaj paroli pri komunaj intereso kaj problemoj. Aŭ, alia ekzemplo, reprezentantoj de studenta organizo (asocio de diplomigintoj de Triesto) ŝatus organizi iun konferencon pri interkulturaj travivaĵoj kaj malfacilaĵoj de nuntempaj studentoj kaj junuloj, laborantaj eksterlande. Kelkaj personoj dum Forumo vere interesiĝis pri Esperanto kiel lingvo kaj vivstilo kaj esprimis intencon almenaŭ kontakti lokajn Esperanto-grupojn en siaj urboj aŭ viziti [www.lernu.net](http://www.lernu.net). Aliaj tamen restis ene de siaj vidpunktoj kaj konvinkoj pri utileco de la angla kaj fieris paroli ĝin, eĉ se ĝi efektive estis nur tiu limigita internacia angla.

Dimanĉe vespere okazis nur solena

legado de poeziaĵoj en kulturdomo de Gorizia kaj mallonga fortepiana koncerto. Menciindas, ke tute hazarde proksime al tiu kulturdomo oni povis vidi Esperanto-ŝildon sur dometo, kiu verŝajne estis Esperanto-klubejo, kaj eĉ la nomo de strateto estis taŭga – *Passaggio Zamenhof*. Por partoprenantoj de Forumo, kiuj nur matene eksciis pri ekzisto de Esperanto kaj tuj konatiĝis persone kun kelkaj “vivantaj” Esperantistoj, tiu malkovro ŝajnis mirakla, nekredibla



provo ke “vi, esperantistoj estas ĉie”. Kontraŭdiri tion bonŝance ne eblis.

*Kaj tute neatendite la Forumo havis ian daŭrigon, ĉar lundon matene la loka Esperanto-grupo devis surbendigi elsendon enkadre de “programmi dell’accesso” por RAI 1. Oni profitis ĉeeston de Alla, eksterlanda gasto kaj aktiva esperantistino, por resume paroli pri la ĵus pasinta Forumo kaj pri kontribuo de Esperanto kiel ilo por dialogi kaj protekti lingvajn rajtojn.*

Do, tiel pasis tiuj 3 intensaj tagoj en bela apud-landlima urbo Trieste kun tiom da novaj kontaktoj kaj esperoj pri estonta kunlaboro.

Alla KUDRYAŜOVA, Bolonjo/Moskvo

Forum Giovani Internazionale  
“Diritto di Dialogo”

Trieste, 2008-09-26 ĝis 2008-09-28

*I giovani credono in una lingua universale?*

## Kiel oni pasigas la Oranĝan Renkontiĝon en Svedujo

Ĉi-jare mi unuafoje partoprenis Oranĝan Renkontiĝon (OR) kaj mi estis impresita de agrabla kvazaŭ “familia” etoso. Estas interesa fakto, ke mi estis la unua gasto de orienta Eŭropo kaj la Oranĝa Renkontiĝo mem estis nur la dua ☺ Espereble sekvajare, venos pli da eksterlandaj gastoj .

### Loko

La aranĝo mem estis en Hernusando, je la distanco de 900 kilometroj de Gotenburgo, aŭ 1200 kilometroj de Ystad (urbo en suda bordo de Svedujo), tamen laŭ

sveda vidpunkto tio ne estas nordo, nur mezo de Svedujo. Sed por mi, kiel indiĝeno de apudnigramara regiono, kompreneble, estis okulfrapa la nordeco de la belega naturo. Kion diri, eĉ Polujo por mi nordas, do ĉio relativas.

### La OR-ejo mem

Estas ligna bela domo, kiu aspektas kiel kasteleto. Apud la maro, inter la fabela arbaro de kie povas aperi elfoj aŭ eble troloj aŭ aliaj estaĵoj. Sed ni ĉeestis nur dum semajnfino, tro mallonge por renkonti elfojn sed ni havis unu lecionon



de esperanta elfa skribado.

La aranĝo mem daŭris nur semajnfinojn, de la 5-a ĝis la 7-a de Septembro.

Al tiu loko iuj biciklis iuj venis per aŭto. De Hernusando kompreneble. Ĉi-vespere ni elektis ĉambrojn kaj tiuj kiuj volis dormi trankvile povis elekti dormi en la najbara konstruaĵo. Ankaŭ venis multe da gastoj-neesperantistoj nur por ĝui la koncerton de La Perdita Generacio.

La Perdita Generacio ĉi-vespere debutis sian albumon "Eksplodigos vian domon". Ĉiuj unuafoje aŭdis la dua albumon de La Perdita Generacio. Antaŭe mi ilin aŭdis nur dum KEF en Kopenhago kie ili prezentis nur la kanton "Malantaŭe".

### La plej programplena tago estis sabato

La plej interesa kaj certe originala parto de OR estis la tutmonda ĉampionado de Bakio, kiu okazas nur dum OR. Ĉu vi neniam aŭdis pri tiu ludo? Tiam vi nepre devas veni al OR. Tiun ludon oni povas ludi pere de ŝakaj pecoj. Sed la reguloj estas tute aliaj. Dum la OR vi ankaŭ havos eblecon ekoni la inventinton de Bakio. Post la Bakio ni ludis hompilkon, kaj interalie festis la 50-jariĝon de SEJU; tiutage venis multe da gastoj. Kaj poste vespere jam tradicie okazis saŭnumado, kaj babilado kaj di-boĉado kun amikoj. Do tiuj tri tagoj trapasis kiel fabelo,

naĝado en nokta malvarma maro post saŭnumado, promenado en arbaroj kie ni vizitis malnovegan tombmonteton. La plej trista momento kompreneble estis adiaŭo. Sed ne por ĉiuj estis nur tiuj tri tagoj; ankaŭ estis homoj kiuj venis pli frue kaj pli malfrue foriris estis tiel nomataj antaŭkongreso kaj postkongreso.

Kion ankoraŭ menci: la specialan festan etoson de Oranĝa Renkontiĝo, kun brile vestitaj homoj kaj vegetara manĝaĵo for de aliaj homoj, kaj mire, sen alkoholo sed kun plena sento de libereco.

Tamen sekvajare eblas ĝui pli da tagoj en Nordlando, Svedujo. Sekvajara OR okazos ekde la 28-a ĝis la 30-a de Aŭgusto, por ke studentoj sukcesu atingi la lernejon. Kaj antaŭ la OR ekde la 24-a de Aŭgusto ni promenos dum 4 tagoj en sveda naturo! Ĉiuj kiuj ŝatas belegan naturon kaj adventurojn, venu!

Sasha MURR, Ukrainujo/Polujo





## 1887 membroj uzas la Jarlibron rete

La nombro de individuaj membroj de UEA, kiuj registriĝis kiel uzantoj de la reta Jarlibro ĉe [reto.uea.org](http://reto.uea.org), atingis 1887 la 23-an de oktobro. Proksimume triono de la individuaj membroj utiligas tiun eblon, kiu estis enkondukita en aprilo 2005 kaj kies plej evidenta avantaĝo kompare kun la presita Jarlibro estas ĝia konstanta ĝisdateco. Ne nur la adresinformoj de delegitoj estas aktualaj, sed ankaŭ novaj delegitoj troviĝas tie tuj post la registro de ilia delegiteco en la Centra Oficejo.

Per la reta Jarlibro alireblas ankaŭ aliaj informoj konataj el la klasika Jarlibro, ekz. pri landaj kaj fakaj asocioj, kaj pri la gvidorganoj de UEA kaj TEJO. Granda faciligo, ankoraŭ ne sufiĉe konata, estas la eblo povi rekte skribi al la retadres-havaj delegitoj, komitatanoj, estraranoj, perantoj kaj aliaj funkciuloj de UEA, TEJO kaj aliaj asocioj, klakante tiucelan butonon ĉe la koncerna nomo. Individua membro povas ankaŭ kontroli la personajn informojn pri si mem kaj sciigi la Centran Oficejon pri eblaj korektendaĵoj. Ankaŭ tion oni povas fari ene de la reta Jarlibro klakante butonon, kiu malfermas

formularon por tio.

Tiuj, kies membrokotozito rajtigas je ricevo de la revuo "Esperanto", povas pere de la reta Jarlibro legi ĝian plej novan numeron jam, kiam ĝia papera versio ankoraŭ estas presata. Eblas elŝuti PDF-version ne nur de la plej lasta numero sed ankaŭ de pli fruaj numeroj ekde 2004. Junaj membroj kaj Patronoj de TEJO povas elŝuti numerojn de "Kontakto" ekde 2004 kaj de "TEJO tutmonde" ekde 2006.

Iom post iom oni aldonos pli da eblecoj kaj servoj. Por utiligi la retan Jarlibron necesas unue registriĝi kiel uzanto ĉe la adreso [reto.uea.org](http://reto.uea.org).

Same kiel inter la individuaj membroj ĝenerale, ankaŭ en la uzantaro de la reta Jarlibro la plej granda lando estas Francujo, kun 196 uzantoj, t.e. 34,2% de la tieaj membroj. En la pinta deko troviĝas krome Usono (143 uzantoj - 46,6%), Germanujo (137 - 26,1%), Brazilo (114 - 36,1%), Japanujo (95 - 23,9%), Italujo (75 - 36,4%), Nederlando (74 - 29,5%), Hispanujo (65 - 45,1%), Rusujo (63 - 30,7%) kaj Belgujo (59 - 37,1%).

*Laŭ gazetara komuniko de UEA*

## Lingvaj gvidlinioj de TEJO Tutmonde

Antaŭnelonge TEJO ricevis plendon pro la uzo de la neoficialaj vortoj "na"<sup>1</sup> kaj "ŝli"<sup>2</sup> en la jarraporto 2008. Sekve okazis iom da ide-interŝanĝo pri lingvouzo en raportoj kaj en TEJO Tutmonde, ĉefe inter la TEJO-prezidanto Gregor HINKER kaj la TT-redaktisto Marcos CRAMER.

Oni notu ke ekzistas jena regulo en la regularo de TEJO:

*La sola oficiala lingvo de TEJO estas*

*la internacia lingvo Esperanto tia, kia ĝi estas difinita de:*

- (i) *sia Fundamento,*
- (ii) *la verkaro de sia iniciatinto Ludoviko Zamenhof; kaj*
- (iii) *la ĝenerala lingva uzado sub kontrolo de la Akademio de Esperanto.*

Laŭ Gregor, rigora sekvado de tiu regulo necesas precipe en oficialaj raportoj. Lia propono estis:

- lingvouzado en oficialaj raportoj estu

(daŭrigo sur paĝo 16)

## Ĝeneralaj informoj pri TEJO

TEJO estas mallongigo de *Tutmonda Esperantista Junulara Organizo*. Ĝi estas la junulara sekcio de UEA, la *Universala Esperanto-Asocio*.

TEJO popularigas internacian kompreniĝon per renkontiĝoj, edukaj programoj kaj uzo de internacia lingvo, Esperanto.

La organizo defendas kulturen riĉecon de lingva diverseco, homajn rajtojn de lingvaj minoritatoj kaj tutmondan kompreniĝon per facila aliro al internaciaj kontaktoj. Uzo de Esperanto estas kadro de niaj klopodoj.

Retadreso: [www.tejo.org](http://www.tejo.org)

## Centra Oficejo de UEA/TEJO

Nieuwe Binnenweg 176  
NL-3015 BJ Rotterdam  
Nederlando

Tel.: (010) 436 1044  
Faksilo: (010) 436 1751,  
Retadreso: [uea@co.uea.org](mailto:uea@co.uea.org)

## Estraro de TEJO

• Gregor HINKER (Prezidanto, Eksteraj Rilatoj)  
Schelleingasse 54/24, 1040 Wien, Aŭstrujo  
Retadreso: [gregor@tejo.org](mailto:gregor@tejo.org)

• Anna-Laura H. WICKSTRÖM (Ĝenerala Sekretario)  
Militärstrasse 14, 8004 Zürich, Svisujo  
Retadreso: [anna-laura@tejo.org](mailto:anna-laura@tejo.org)

• Vildana DELALIĆ (Seminarioj kaj aktivula trejnado)  
A.B. Šimića 5, Sarajevo 71000, Bosnujo-Hercegovino  
Retadreso: [vildana.delalic@hotmail.com](mailto:vildana.delalic@hotmail.com)

• Sergej TYRIN (Kasisto)  
P.O.K 15092, Be'er Ševa 84120, Israelo  
Retadreso: [interdist@gmail.com](mailto:interdist@gmail.com)

• Rogener PAVINSKI (Landa agado)  
Av. Lafaiete Costa Couto, 1447  
Ribeirão Preto - SP - Brazilo - 14060-450  
Retadreso: [rogener@tejo.org](mailto:rogener@tejo.org)

## Membroservoj de TEJO

Kiel membro de TEJO vi ricevas:

- la gazeton TEJO Tutmonde
- la revuon Kontakto
- rabaton por la Internacia Junulara Kongreso kaj la Internacia Seminario
- eblon partopreni en seminarioj
- eblon havi blogon ĉe [tejo.org](http://tejo.org)
- eblon involviĝi en interesa kaj internacia agado

Kaj tre grave: vi helpas al la junulara movado de Esperanto!

Se vi aĝas pli ol 30 jarojn kaj volas ĝui la samajn avantaĝojn (kaj revuojn) kiel membroj de TEJO, kaj aldone subteni TEJO-n, vi estas bonvenigata fariĝi Patrono de TEJO. (Pliaj informoj sur [www.tejo.org/patrono](http://www.tejo.org/patrono) aŭ de la Centra Oficejo).

## Agado de TEJO

La agado de TEJO konsistas precipe el:

- informado en junularaj medioj pri la lingva problemo en internaciaj rilatoj kaj pri ĝia solvo per Esperanto
- praktika utiligo de Esperanto je la servo de la junularo kaj informado pri tio en junularaj medioj
- okazigo de kongresoj, konferencoj, seminarioj kaj aliaj kunvenoj
- instigado al la membroj de TEJO aktive partopreni en la Esperanta movado.
- Aktivula Trejnado (pli da informoj ĉe [www.tejo.org/aktivula\\_trejnado](http://www.tejo.org/aktivula_trejnado))
- Eldono de Pasporta Servo, la adresaro de gastigantoj kiuj pretas senkoste gastigi Esperantistojn; ĉiujare aperas ĝisdatigita eldono.

## Subtenu la agadon de TEJO

Ekzistas multe da ebloj helpi TEJO-n en sia agado. La plej gravaj estas membriĝi aŭ patroniĝi. Sed vi ankaŭ povas helpi al konkretaj agadoj de TEJO. Mondonacojn al ĝenerala agado de TEJO bv. pagi al la UEA-konto "tejtej" (indiku celon de donaco, ekz: "donaco por KER" aŭ "donaco por landa agado"). Ankaŭ eblas donaci tiel por specifaj celoj:

- Fonduso "Partoprenu IJK-n" – TEJO per ĝi subvencias la partoprenon de TEJO-aktivuloj al IJK
- Pasporta Servo – eble la plej fama eldonaĵo de TEJO

Por pliaj detaloj pri pagmanieroj, bv. rigardi ĉe [www.uea.org/alighoj/pag\\_manieroj.html](http://www.uea.org/alighoj/pag_manieroj.html) aŭ demandi ĉe la Centra Oficejo.

TEJO dankegas vin pro via subteno!

celata konformi al la Akademio de Esperanto. (En ili do estonte ne plu povos aperi "na" aŭ "ŝli", almenaŭ ĝis kiam tiuj estas akceptataj de la Akademio.)

- lingvouzo en personaj kontribuoj al TEJO Tutmonde povas esti pli libera, ene de limoj (kiujn difinas la redaktisto, kiu publikigu etan komenton pri siaj lingvo-gvidlinioj pro travidebleco).

Do jen sekvas la lingvaj gvidlinioj, kiujn la redaktisto sekvas dum redaktado de ne-oficialaj kontribuoj senditaj al li:

### Gramatiko

- Ĉar PMEG bone prezentas la gramatikon de la tradicia (Fundamenta, Zamenhofa kaj Akademia) lingvouzo, mi uzas ĝin kiel ĉefan fonton por decidi pri la ĝusteco de pridubeblaj gramatikaj konstruoj.

- Kiam PMEG ne sufiĉe detale traktas iun temon, aŭ kiam mi havas kialon por dubi pri la boneco de ĝia rekomendo, mi konsideras ankaŭ la rekomendojn en PAG kaj la uzojn en la Tekstaro de Esperanto.

- Gravas esprim-klareco: En dubaj kazoj, mi ankaŭ konsideras, ĉu korektado igus la frazon pli klara.

### Stilo:

- Mi sekvas la stilrekomendojn en PMEG kaj mian propran senton de kio estas bona Esperanta stilo.

- Mi evitas fari tro multajn stilajn ŝanĝojn.

### Vortprovizo:

- Novradikojn, kiuj ne troviĝas kaj en ReVo kaj en PIV, mi aŭ klarigas per piednoto aŭ eĉ tute anstataŭigas per kunmetaĵo aŭ plurvorta esprimo kun la intencita signifo. (Oni ja ne povas atendi, ke ĉiu leganto povas kontroli vortojn kaj en ReVo kaj en PIV.)

- Anstataŭigo estas preferata al piednota klarigo precipe kiam temas pri novradiko,

kiu estas nek oficialigita de la Akademio nek sufiĉe enradikiĝinta en la ĝenerala lingvouzo kaj por kiu sen-probleme troviĝas samsignifa alternativo.

- Por trovi taŭgajn alternativojn al evitindaj novradikoj, mi konsultas la liston de simplaj samsignifaj vortoj: [tinyurl.com/simplaj](http://tinyurl.com/simplaj)

- Por unuecigi la uzon de lingvonomoj en TEJO Tutmonde, mi uzas la sufikson "-uj-" por ĉiuj lingvonomoj formitaj surbaze de gentonomoj (Germanujo, Ĉinujo, Rusujo ktp). Tio plifaciligas la ĝustan komprenon de la dukategorieco de la landnomoj en Esperanto. Vidu tiurilate ankaŭ la artikolon "La landnoma sufikso -ujo en instruado" de Bertilo WENNER-GREN: [tinyurl.com/landnomoj](http://tinyurl.com/landnomoj)

- Kvankam mi persone plej ofte sekvas la tradician lingvouzon, laŭ kiu "li" povas esti uzata por nedifinita persono de ajna sekso aŭ por persono de nekonata sekso, mi akceptas la uzon de "ŝli" en tiaj situacioj, ĉar ĝi laŭ mi estas parto de laŭdinda provo sekse simetriigi la Esperantajn pronomojn. Estus maljuste sufoki tiun provon antaŭ ol oni sufiĉe eksperimentis kun ĝi. Aliajn malpli facile kompreneblajn variantojn (ekzemple "ri" aŭ "gi") mi tamen anstataŭigas per "ŝi/li".

- Pro similaj kialoj mi ankaŭ ne forigas la akuzativan prepozicion "na", kiam iu kontribuanto uzas ĝin.

<sup>1</sup> "na" estas proponita akuzativa prepozicio uzata precipe kun mallongigoj kaj propraj nomoj, ekzemple "mi ŝatas na UEA" anstataŭ "mi ŝatas UEA-n"

<sup>2</sup> "ŝli" estas proponita pronomo uzata antaŭ "li" (aŭ anstataŭ "ŝi aŭ li"), kiam oni parolas pri nedifinita persono de ajna sekso aŭ pri persono de nekonata sekso, ekzemple "se iu volas manĝi vegane dum la kongreso, ŝli devas tion indiki en la aliĝilo".